WIKIPEDIA

Tokpisino

Tokpisino (**Tok-Pisino** aŭ longe **Tokpisina lingvo**) estas kreola lingvo kun anglalingva vort-bazo, parolata de ĉirkaŭ tri ĝis kvar milionoj da homoj, 120.000[1] el ili denaskaj.

ISO-lingvokodo :

639-1 =	mankas
639-3 =	**tpi**

Ekde 1975 ĝi estas unu el la tri oficialaj lingvoj de Papua-Novgvineo. La du aliaj estas la angla kaj la hirimotua.

Krome ĝi estas simila al aliaj kreolaj lingvoj, kiel ekz. Bislama sur Vanuatuo, Pijin sur la Salomonoj kaj Toresa kreola lingvo sur Toresa Markolo (Aŭstralio), kiuj estiĝis el la melanezia piĝino.

Tokpisino

Tok Pisin

Parolata en	Papuo-Nov-Gvineo
Parolantoj	122 000
Denaskaj parolantoj	120.000[1]
Fremdlingvo / dua lingvo por	ĉ. 3-4 milionoj
Skribo	latina

Lingvistika klasifiko

Kreola lingvo

Angle bazita kreola lingvo

Tok-Pisino

Oficiala statuso

Oficiala lingvo en	Papuo-Nov-Gvineo

Lingvaj kodoj

Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	tpi
ISO 639-3	tpi
SIL	tpi (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=tpi)
Glottolog	tokp1240
Angla nomo	Tok Pisin
Franca nomo	tok pisin

Specimeno

Patro Nia

Papa bilong mipela
yu stap long heven.
Mekim nem bilong yu i kamap bikpela.
Mekim kingdom bilong yu i kam.
Strongim mipela long bihainim laik bilong yu long graun,
olsem ol i bihainim long heven.
Givim mipela kaikai inap long tude.
Pogivim rong bilong mipela,
olsem mipela i pogivim ol arapela i mekim rong long mipela.
Sambai long mipela long taim bilong traim.
Na rausim olgeta samting nogut long mipela.

Enhavo

Nomo de la lingvo

Oficialeco kaj parencaj lingvoj

Ĝenerale

Fonetiko
- Konsonantoj
  - Pli anglece
- Vokaloj
- Apartaĵoj kompare al la angla

Gramatiko
- Verboj
  - Partiklo *i*
  - Partikloj por tempoj
  - Progresa formo
  - Modalaj verboj
  - Kopulo
  - Adverbaj sufiksoj
- Pronomoj
- Demandaj vortoj
- Substantivoj
  - Kunmetado
- Adjektivoj

Adverboj
Prepozicioj
Konjunkcioj
Numeraloj
Pliaj trajtoj
Vortotrezoro
Kunmetado
Afiksoj
Varia ortografio
Sencaj diferencoj
Homonimio
Notoj
Fontoj
Vidu ankaŭ
Eksteraj ligiloj

Amen.

Vikipedio

Nomo de la lingvo

La vorto Tokpisino estiĝis el *tok* kaj *pisin*. Ĉe tio *tok* venas de la angla *talk*, signife "parolado", sed ankaŭ "vorto", "mesaĝo" aŭ "lingvo". *Pisin* signifas "piĝino" kaj origine venis de la angla *business* (sed influate ankaŭ de *pigeon*, "birdo"). Male al la sugesto de la nomo, Tokpisino ne estas piĝino, sed kreola lingvo.

Antaŭe la lingvo havis aliajn nomojn, nome Melanezia Piĝino (angle *Melanesian Pidgin*), Novmelanezia (angle *Neo-Melanesian*), Piĝina Angla (angle *Pidgin English*) kaj 'Tok Boi'. Sed nun 'Tok Pisin' estas la ĝenerale akceptita nomo de la lingvo.

Oficialeco kaj parencaj lingvoj

Ĝi estas unu el la oficialaj lingvoj de Papuo-Nov-Gvineo, kun la angla kaj la hirimotua), kaj la plej parolata lingvo en la loko. Oni uzas ĝin en la komunikiloj kaj la regado de Papuo-Nov-Gvineo, kvankam malpli ol la anglan. Certaj bazaj lernejoj instruas per Tok-Pisino.

Oni ne uzu Bislamon kiel nomon por Tok-Pisino. Ili estas du malsamaj lingvoj, kiuj tamen estas proksime parencaj.

Ĝenerale

La lingvo servas antaŭ ĉio al la komunikado inter anoj de diversaj lingvaj komunumoj, sed havas - alie ol plej grandaj Piĝinaj lingvoj - ankaŭ pligrandiĝantan nombron de gepatraj parolantoj.

85% de la vortotrezoro baziĝas sur la angla lingvo, dum ke la resto konsistas el melaneziaj vortoj, sed eĉ vortoj el germana ekzistas. La lingvo havas multajn dialektojn, kiel ekz. pli forte de la angla influitan *Waigani-Pidgin* ĉirkaŭ Port Moresby. Tokpisino evoluis el piĝina lingvo, sed ĉiu tiu evoluo ankoraŭ daŭradas, ĉar gepatraj parolantoj el ĉiuj parolantoj ankoraŭ estas minoritato. Sed ĉi tiu grupo ege kreskas, dum ke multaj lingvoj kun nur malgrandaj nombroj de parolantoj formortas.

Ekzemploj:

- apinun "posttagmezo; vespero; bonan posttagmezon"
- misis "blanka virino, blankulino; edzino"
- sik "malsana; malsano, malsaneco; malsani, esti malsana"
  - haus sik "malsanulejo"
- gude "bonan tagon"
- kaikai "manĝo, manĝaĵo; manĝi"
- bulut, blut "sango" (el la germana *Blut*)
- tenkyu "dankon"

Fonetiko

La fonetiko de Tokpisino estas pli simpla ol tiu de la angla lingvo. Ekzistas nur 16 konsonantoj kaj 5 vokaloj.

Konsonantoj

	Labialoj	**Koronaloj**	**Palataloj**	**Velaroj**	**Glotaloj**
Kluziloj	p b	t d		k g	
Frikativaj	(f) v	s			h
Nazaloj	m	n		ŋ	
Lateralo		l			
Aproksimantoj	w		j		
Vibranto		r			

- Kie montriĝas du simboloj, la maldekstra reprezentas la senvoĉan konsonanton.
- t, d, kaj l povas esti aŭ dentalaj aŭ alveolaraj konsonantoj, dum ke n estas nur alveolara.
- b, d, kaj g povas esti en kelkaj dialektoj prenazalaj: ^{m}b, ^{n}d kaj ^{ŋ}g.[1]
- f v estas bilabiale prononcataj de pli aĝaj parolantoj: ɸ β, sed f ofte ne estas distingata de p.[1]
- En la plej multaj dialektoj de Tokpisino, r estas bateto (angle *tap*) aŭ frapeto (angle *flap*).

Pli anglece

En prononco, kiu estas pli simila al la angla lingvo, ekzistas pliaj fonemoj, nome: ʃ, θ, ʒ, dʒ, ð, z kaj tʃ.[1]

Fonemo	Ekzemplo	Ekzemplo kun aldona fonemo[1]	Senco
dʒ	vilis, viles	vilidj	vilaĝo
ʃ, f	pis	fish	fiŝo
f	lip	lif	folio
ð	klos	kloudhz	vestaĵo
tʃ	tisim	tichim	instrui
dʒ	senis	cheinj	ŝanĝo; ŝanĝi

Vokaloj

Tok Pisin havas kvin vokalojn, kiuj similas al la vokaloj en la hispana, japana kaj pliaj kvinvokalaj lingvoj:

	Antaŭa	Centra	Malantaŭa
Ferma	i		u
Meza	e		o
Malferma		a	

Krome ekzistas tri diftongoj, nome *ai*, *au* kaj *oi*.

> *kaikai* "manĝo, manĝaĵo; manĝi"
> *haus* "domo"
> *boi* "servisto; knabo"

Apartaĵoj kompare al la angla

Vortofine ne estas voĉaj konsonantoj, tiel ke el la konsonantoj **b**/**v**, **d**, **g**, **ĝ**/**dz** fariĝas la konsonantoj **p**, **t**, **k**, **s**. Nur la vorto **god** ŝajnas esti escepto, sed ĝi estas prononcata kun fina **t**.

Tokpisino	Etimo	Senco
bak, bek	angle bag	poŝo
bet	angle bed	lito
bilip	angle believe	kredi
bis	angle beads	kolĉeno; perloj
bris	angle bridge	ponto
hait	angle hide	sekreta
jas	angle judge	juĝo
rot	angle road	kurso; pado

Vortofinaj konsonantosekvoj ankaŭ malaperas. Ĉi tie eblas du variantoj:

- forfalo
- interŝovo de vokalo.

Tokpisino	Etimo	Senco
akis	angle axe	adzo
amaun	angle amount	
danis	angle dance	danco
das	angle dust	polvo
gip	germane Gift	veneno
sikis	angle six	ses

Gramatiko

Kiel aliaj kreolaj lingvoj tokpisino havas relative facilan gramatikon. Ne ekzistas konjugacio nek deklinacio.

Verboj

En tokpisino ekzistas tri verbaj klasoj.

- Verboj kun la sufikso (*-im*, el la angla *him*), kiuj estas transitivaj, kiel ekz. *giv* "doni", *givim* " (kion/kiun) doni".
  - Sed kelkaj verboj povas esti transitivaj sen la sufikso, kiel ekz. *gat* "havi", *kaikai* "manĝi; manĝo" (La verbo *kaikaim* havas alian signifon, nome "mordi").
  - Multaj verboj ĉiam devas uzi la finaĵon *-im*, ekz. *abusim* "miksi", *ainim* "gladi", *askim* "demandi; demando", *baim* "aĉeti", *bihainim* "sekvi", *harim* "aŭdi", *larim* "permesi".
  - Kelkaj verboj povas esti transitivaj kun sed ankaŭ sen la finaĵo, ekz. *bilip*, *bilipim* "kredi", *dring*, *dringim* "trinki", *lain*, *lainim* "lerni". La formoj sen la finaĵo *-im* postulas la prepozicion *long*.
  - Kelkaj verboj estas kun la finaĵo *-im* transitivaj, sed sen la finaĵo estas netransitivaj, ekz. *boil* "boli", *boilim* "boligi"; *op*, *opim* "malfermi", *pait*, *paitim* "bati".
- Verboj en origina formo, do sen *-im*, kiuj estas netransitivaj.
  - Kelkaj verboj aperas nur sen finaĵo, ekz. *beten* "preĝi", *dai* "morti", *go* "iri", *kam* "veni", *krai* "krii", *ran* "kuri" (La transitiva verbo *ranim* havas alian signifon, nome "ĉasi").
  - Multaj verboj povas aperi ankaŭ kun la finaĵo *-im* kaj tiam estas transitivaj, ekz. *bruk* "rompiĝi", *brukim* "rompi"; *hait* "kaŝiĝi", *haitim* "kaŝi".
- Helpaj verboj.

Ĉe kelkaj verboj la netransitiva formo duobligas silabon, dum ke ĉi tiu duobligo ĉe devena formo je *-im* ne estiĝas. Ekz.

- *lukluk* "rigardi"; *lukim* "vidi",
- *toktok* "paroli kun iu"; *tokim* "rakonti ion al iu / iun pri io".

Multaj verbaj radikoj povas esti uzataj kun sufikso aŭ sen sufikso.

Netransitiva	Traduko	Transitiva	Traduko
Mi save rait. Mi inap rait.	Mi povas skribi.	Mi save raitim pas. Mi inap raitim pas.	Mi povas skribi leteron.
Em i rit.	Li/Ŝi legas.	Em i ritim buk.	Li/Ŝi legas libron.
Wara i boil pinis.	(La) akvo bolis.	Meri i boilim wara pinis.	(La) virino boligis la akvon.
Mi lukluk.	Mi rigardas.	Mi lukim yu. // Mi lukim bikpela man.	Mi vidas vin. // Mi vidas grandan viron.
Mi giv.	Mi donas.	Mi givim kaikai long meri.	Mi donas al (la) virino manĝ(aĵ)on.
Mi kat.	Mi tranĉas.	Mi katim prut.	Mi tranĉas frukton.

Multaj verboj havas nur la transitivan formon kun la finaĵo -im.

Transitiva	Traduko	Komento
askim	demandi; demando	Ĝi ankaŭ povas estis substantivo.
kisim	preni; ricevi; akiri	

pilim	senti; tuŝi	
putim	meti	
salim	vendi // sendi	Por la traduko *sendi* estas alternative uzata la varianto *salim i go*.
yusim	uzi	

Kelkaj transitivaj verboj je *-im* baziĝas sur aliaj vortospecoj, kiel ekz. substantivo, adverbo, adjektivo.

Vortospeco	Baza formo	Traduko	Transitiva verbo	Traduko
adverbo	bek	reen	bekim	rekompenci; redoni
adverbo	bihain	post, malantaŭ	bihainim	sekvi; imiti
substantivo	bilip	kredo	bilipim	kredi
substantivo	brum	balailo	brumim	purigi
adjektivo	daun	profunda	daunim	venki, gajni; malsupren lasi
substantivo	kom	kombilo	komim	kombi
substantivo	kot	kortumo; juĝo	kotim	akuzi; plendi; kondamni
substantivo	lait	lumo	laitim	bruligi
substantivo	win	spiro; aero; vento	winim	blovi
substantivo	win	venko	winim	gajni; superi

Kelkfoje la finaĵo *-im* ebligas distingi inter vortoj, kiuj alikaze estus homonimoj.

Vortospeco	Baza formo	Traduko	Transitiva verbo	Traduko
substantivo	het	kapo; ĉefa	hetim	malami; malestimi // kapumi (piedpilkon)
adjektivo	holi	sankta	holim	teni
substantivo	kari // kar	kareo // aŭto	karim	alteni; naski; porti
adjektivo	kol	malvarma	kolim	voki

Partiklo *i*

Post pronomoj por la 3a persono en la singularo, ĉiuj personoj en pluralo kaj post substantivoj kiel subjekto devas stari la partiklo *i*. En la unua kaj dua personoj de la singularo ĝi estas neniam uzata. En la angla lingvo ĝi nomiĝas *predicate marker*.

Post la sekvaj vortoj la partiklo *i* povas ellasiĝi: *mipela*, *yupela*, *ken*, *laik*. La partiklo staras antaŭ la partiklo *no*, kiu markas la negacion.

Kelkfoje la partiklo *i* tradukiĝas kiel formo de la verbo "esti" .

Sen partiklo *i*	Traduko	Kun partiklo *i*	Traduko
Pozitivaj frazoj			
Mi kam. // Yu kam.	Mi venas. // Vi (ci)	Em i kam.	Li/Ŝi venas.

	venas.		
Mi kaikai. // Yu kaikai.	Mi manĝas. // Vi (ci) manĝas.	Ol i kaikai.	Ili manĝas.
Mi wok. // Yu wok.	Mi laboras. // Vi laboras.	Tom i wok.	Tom laboras.
Mipela go. // Yupela go.	Ni iras. // Vi iras.	Mipela i go. // Yupela i go.	Ni iras. // Vi iras.
		Sip i longpela.	(la) ŝipo estas longa.
Negativaj frazoj			
Mi no kam. // Yu no kam.	Mi ne venas. // Vi ne venas.	Em i no kam.	Li/Ŝi ne venas.
Mi no kaikai. // Yu no kaikai.	Mi ne manĝas. // Vi ne manĝas.	Ol i no kaikai.	Ili ne manĝas.
Mi no wok. // Yu no wok.	Mi ne laboras. // Vi ne laboras.	Tom i no wok.	Tom ne laboras.
Mipela no go. // Yupela no go.	Ni ne iras. // Vi ne iras.	Mipela i no go. // Yupela i no go.	Ni ne iras. // Vi ne iras.
		Sip i no longpela.	La ŝipo ne estas longa.

Partikloj por tempoj

Ĉar konjugacio mankas, por tempoj estas uzataj partikloj. La pozicio de la partiklo *i* dependas de la uzata partiklo por la tempo. Ĝi staras do antaŭ *bin*, sed post *bai*.

Tempo	Partiklo	Ekzemplo	Traduko
preterito	bin	Mi bin go.	Mi iris.
		Em i bin slip.	Li/Ŝi dormis.
perfekto	pinis	Mi go pinis.	Mi venis.
		Ol i slip pinis.	Ili dormis.
futuro	bai	Mi bai go.	Mi venos.
		Man bai i wok tumora.	(la) viro morgaŭ laboros.

Bai (aŭ la longa varianto **baimbai**) ofte eĉ staras antaŭ la subjekto, kiel ekz.

- **Bai mi save.** "Mi scios."
- **Baimbai em i kaikai kek.** "Li/ŝi manĝos kukon."

Progresa formo

Por la progresa formo de prezenco ekzistas kvar eblecoj:[2]

- per postmetita vorto *i stap*.
  - *Pikinini i kaikai i stap.* "La infano estas manĝanta."
- per antaŭmetita vorto *stap*.

    - *Mi stap kaikai kek.* "Mi estas manĝanta kukon."
    - *Pikinini i stap kaikai kiau.* "Infano estas manĝanta ovon."
- per sekva *nau*.
    - *Papa i slip nau.* "Patro dormas nun."
- per antaŭmetita *wok long*.[1]
    - *Mi wok long drilim hul bilong skru i go insait bihain.* "Mi estas boranta truon por ŝraŭbo enmetata poste."

Eĉ eblas kombinoj, kiel ekzemple el *i stap* kaj *nau*.

- *Jon i wok i stap nau.* "Jon estas laboranta." (Ĉi tie *stap* sekvas al la ĉefa verbo.)

La postmetita *i stap* povas esti kombinata kun esprimoj de la estinteco.[2]

- *Asde pikinini i rait i stap.* "Hieraŭ la infano skribis."
- *Mi bin slip i stap.* "Mi estis dormanta."

Modalaj verboj

Tokpisino havas kelkajn modalajn verbojn.

Verbo	Senco	Etimologio	Ekzemplo	Traduko
laik[1][3]	ŝati	angle like	Man i laik wok.	(la) viro ŝatas labori.
save[1][4]	*kutimo*	portugale saber	Wokboi i save wok long fonde.	(la) laboristo kutime laboras ĵaŭde.
ken[3]	rajti	angle can[1]	Meri i ken wok.	(la) virino rajtas labori.
mas[1][3]	devi	angle must	Em i mas wok.	Li/Ŝi devas labori.
inap[1][5]	povas	angle enough[1]	Jon inap wok.	Jon povas labori.

[1] Staras eble pro fonologiaj formoj (*i* + *inap* > *inap*) sen la partiklo *i*. Sed ĉe negacio la partiklo *i* estas uzata.[1]

Kopulo

Ekzistas tri eblecoj traduki la verbon *esti* en tokpisinon.

- Se substantivo estu difinata, la partiklo *i* estas uzata. Ekz. *Ol pik i enimal.* "Porkoj estas bestoj."
- Se temas pri momenta stato, tiam la vorto *stap* estas uzata. ekz. *Mi stap we?* "Kie mi estas?", *Yu stap long haus.* "Vi estas en (la) domo.", *Mi stap gut.* "Mi fartas bone."
- Se temas pri ĉeesto aŭ ekzisto de io (germane *da ist; es gibt*), tiam la verbo *gat* esta uzata. Ekz. *I gat wanpela pukpuk long riva.* "Ekzistas/Estas krokodilo en la rivero."

Adverbaj sufiksoj

Kelkaj adverbaj afiksoj povas esti uzataj, por krei pliajn verbojn.[6]

- *an* (angle on), ekz. *goan* "kontinui; plu iri"
- *ap* (angle up), ekz. *kamap* "alveni; leviĝi (suno); komenci; aperi; kreski"; *goap* "grimpi"
- *aut* (angle out), ekz. *kamaut* "elveni"
- *daun* (angle down), ekz. *sindaun* "sidi; resti; loĝi; ĉeesti"
- *awe*, *ewe*, *owe* (angle away), ekz. *tekewe* "forpreni; forigi"; *ranawe*, *ranowe*, *ronowe* "fuĝi; forkuri"

Kelkaj verboj kun la sufikso -*ap*, -*aut* aŭ -*ewe* povas ankaŭ havi la sufikson -*im*.[7]

Kelkaj verboj enhavas la sufikson -*im* dufoje.

- *litimapim* (angle to lift) "levi"
- *pulimapim* "verŝi"

La majoritato de verboj kun tia sufikso nur unufoje uzas la finaĵon -*im*.

- *bagarapim* "neniigi; detrui"
- *goapim* "grimpi"
- *pulapim* "plenigi"

Pronomoj

Personaj pronomoj

Tokpisino havas tri personojn, kiuj ne distingas genrojn.

Gramatika apartaĵo de tokpisino estas du formoj ĉe la personaj pronomoj de la 1-a persono en dualo kaj pluralo, nome ekskluziva kaj inkluziva formoj.

- ekskluziva formo: *Mipela i save* (Ni scias. - Sed nur grupo, por kiu la parolanto parolas, tion scias.)
- inkluziva formo: *Yumi save* (Ni scias. - Kaj grupo, por kiu la parolanto parolas, kaj ankaŭ tiu, al kiu li parolas, tion scias.)

Paradigmo varias depende de surlokaj lingvoj; dualo estas kutima, trialo ja malpli. Plej granda inventaro de pronomoj de tokpisino estas:[8][9]

	Singularo	**Dualo**	**Trialo**	**Pluralo**
1-a ekskluziva	mi (mi)	mitupela (li/ŝi kaj mi)	mitripela (ambaŭ kaj mi)	mipela (ili kaj mi)
1-a inkluziva	-	yumitupela (vi/ci kaj mi)	yumitripela (ni ambaŭ kaj mi)	yumipela / yumi (vi (ĉiuj) kaj mi)
2-a	yu (ci)	yutupela (vi ambaŭ)	yutripela (vi tri)	yupela (vi kvar aŭ pli)
3-a	em (li/ŝi)	tupela (ili ambaŭ)	tripela (ili tri)	ol (ili kvar aŭ pli)

Posesivaj pronomoj

La posesivaj pronomoj estas esprimataj per la antaŭtmetita vorto *bilong* laŭ la sekva maniero:[8][10]

- *haus bilong mi* "mia domo"
- *dok bilong em* "lia hundo"

Demonstrativaj pronomoj

Kiel demonstrativaj pronomoj estas uzataj la sekvaj vortoj, se temas pri proksimeco:

- *hia*[11] "ĉi tiu"
  - *Pukpuk hia i gat bikpela tit.*[12][13][14] "Ĉi tiu krokodilo havas grandajn dentojn."
- *em hia*[11][15] "ĉi tiu"
  - *em pusi hia i gat pikinini.* "ĉi tiu kato havas idon."
- *dispela*[11][15] "ĉi tiu"
  - *dispela dok i gat longpela ia.* "ĉi tiu hundo havas longajn orelojn."

Ĉe malproksimeco estas uzata:

- *em ... long hap* "tio, tiu"[11]
  - *Em pusi long hap kaikai liklik rat.* "Tiu kato manĝas muson."

Se la distanco malgravas, estas uzata:

- *em*[15] "(ĉi) tio"

En la pluralo ja estas uzataj la sekvaj formoj:

- *ol ... hia* "ĉi tiuj"[11]
  - *Ol dok hia i kraim, ol dok long hap i slip.* "Ĉi tiuj hundoj bojas, tiuj hundoj dormas."
- *ol ... long hap* "tiuj"[11]
- *em ol*[15] "(ĉi) tiuj"

Krome ekzistas la jenaj pronomoj:

- *em tasol*[15] "tiu ĉi ulo, tiu ĉi aĵo"
- *diskain*[15], *dispela kain*[16] "tia"

Refleksiva pronomo

Vera refleksiva pronomo ne ekzistas. Anstataŭ tio estas uzata *yet* post la persona pronomo.[1][17]

- *mi yet*, *yu yet* ktp.[17]
- *Yu mas lukautim em olsem yu save lukautim yu yet.* "Vi devas atenti lin, kiel vi atentas vin mem."[1]

Ĉe kelkaj verboj estas uzata la duobligo de la verbo.

- *Ol i mas waswas gut wantaim wara na sop.* "Ili devas bone lavi sin per akvo kaj sapo."

En kelkaj regionoj estas uzata *bilong* kun persona pronomo.[17]

- *Mi no katim yu, bilong yu katim yu.* "Mi ne tranĉis vin, vi tranĉis vin."

Reciproka pronomo

En Tokpisino estas diversaj eblecoj traduki "unu la alian/al la alia" ktp.

Unu varianto estas la duobligo de la verbo.[18]

- *Tupela i paitim-paitim. "Ili ambaŭ batas unu la alian."*

Dua varianto estas la kombino de la personaj pronomoj kun la vorto "yet".[14]

- tupela yet
- yumi yet
- mi(tu)pela yet

Ekz. *mitupela i lukim mitupela yet* "ni ambaŭ vidas unu la alian"

Demandaj vortoj

En Tokpisino estas nur kelkaj demandaj vortoj, el kiuj kelkaj estas pronomoj, kelkaj adjektivoj aŭ adverboj.

- *husat*; *wanem man* "kiu(n)"
  - *husat man*[1] "kiu"
  - *husat ol man*[1] "kiuj"
  - *bilong husat* "kies"
- *wanem* "kio; kiu ..."
  - *wanem samting* "kio"
  - *wanem kain*[1] "kia"
  - *bilong wanem*, *watpo*, *wai*, *hausat* "kial"
  - *long wanem hap*[1] "kie"
  - *long wanem as*[1] "pro kiu kaŭzo"
  - *olsem wanem*, *hau* "kiel"
- *wataim*, *wanem taim* "kiam"
  - *long wanem taim*[1] "je kiu tempo?"
- *we* "kie"
- *hamas*, *haumas*, *hamani* "kiom da"
  - *hamas taim* "kiom ofte"

Substantivoj

Substantivoj ne havas kazojn nek genrojn. Por la pluralo staras la vorto *ol* antaŭe, se tie ne staras numeralo.

Singularo	Traduko	Pluralo	Traduko
Mi lukim dok.	Mi vidas hundon.	Mi lukim ol dok. // Mi lukim foapela dok.	Mi vidas hundojn. // Mi vidas kvar hundojn.
Wanpela meri	Unu virino	Tupela meri	Du virinoj

Se vi volas distingi substantivon laŭ sekso, vi povas uzi por la vira estaĵo la vorton *man* kaj por inaj estaĵoj la vorton *meri*. Ambaŭ vortoj ĉiam sekvas kaj formas nominalan frazon.

> *Pukpuk meri i kaikai wanpela dok man.* "Krokodilino manĝis virhundon."
> *pikinini man* "filo"
> *pikinini meri* "filino"
> *paul man* "virkoko"
> *paul meri* "kokino"

Kunmetado

Ekzistas du specoj de kunmetataj substantivoj.

Dise skribataj estas

Laŭ Mihalic tio ne estas veraj kunmetaĵoj, sed nominalaj frazoj.

Substantivo	Laŭvorte		Laŭsence
skin diwai	haŭto/ŝelo	arbo	arboŝelo
masta kot	sinjoro	juro	advokato
kot ren	mantelo	pluvo	pluvomantelo
bokis diwai[1]	kesto	ligno	lignokesto
dua ain[1]	pordo	fero	feropordo
haus kapa[1]	domo	lado	domo kun lada tegmento
mit sol[1]	viando	salo	salita viando
rum slip	ĉambro	dormi/dorm(ad)o	dormejo, dormĉambro
haus lotu	domo	religio; preĝi	preĝejo
haus pepa	domo	papero; dokumento	oficejo

Kune skribataj estas

Laŭ Mihalic nur tio estas veraj kunmetaĵoj. La dua parto tiam estas substantivo, dum ke la unua povas aparteni al diversaj vortospecoj.

Substantivo	Laŭvorte		Unua parto	Laŭsence
sikman	malsana	viro	adjektivo	malsanulo; paciento
skulboi	lernejo	knabo	substantivo	lernanto
skulrum	lernejo	ĉambro	substantivo	lerneja ĉambro
wokboi	laboro, labori	knabo	substantivo, verbo	laboristo

Kelkfoje la rezultanta vorto eĉ ne plu estas substantivo.

Substantivo	Laŭvorte		Unua parto	Laŭsence
kwiktaim	rapida	tempo	adjektivo	baldaŭ

Adjektivoj

Adjektivoj ofte havas la sufikson *-pela* (el la angla "fellow"), kiam ili modifas substantivojn; escepto estas *liklik* "malgranda". *Liklik* estas ankaŭ uzebla kiel adverbo kun la senco "iom", kiel ekz. *dispela bikpela liklik ston*, "ĉi tiu iom granda ŝtono".

Adjektivoj kun unusilaba radiko, kiel ekz. *gut*, *bik*, *nais*, grandparte aperas kun la finaĵo *-pela* kaj staras antaŭ la substantivo, kiun ili priskribu.[19]

> *bikpela haus* "granda domo" (sed *bikpela bilong haus* "grandeco de domo"[1])
> *naispela meri* "bela virino"
> *strongpela man* "forta viro"

Se ili estas uzataj predikate, eblas formoj kun aŭ sen la sufikso *-pela*.[19]

> *Dispela rot i sot.* "Ĉi tiu strato estas mallonga."
> *Dispela rot i sotpela.*

Nur kelkaj neregulaj unusilabaj adjektivoj estas uzataj sen la finaĵo *-pela*. Dek el ili estas tradukataj per participoj de pasinteco, dum ke 17 estas kutimaj adjektivoj. Se ili estas uzataj atribute, ili sekvas la rilatan substantivon.[20]

> *ples hait* "kaŝita loko"
> *han kais* "maldekstra mano"

Adjektivoj kun plursilaba radiko, kiel ekz. *nogut* "malbona", *redi* "preta" ĉiam aperas sen la finaĵo *-pela* kaj kutime staras post la substantivo, kiun ili priskribu.[21]

> *taim nogut* "malbona vetero"
> *skulboi orait* "kontenta lernanto"

Nur kelkaj adjektivoj, kiel ekzemple *liklik* "malgranda" staras antaŭ la substantivo.[21]

> *liklik haus* "malgranda domo"
> *lapun papa* "maljuneta viro"

Komparacio

Por la komparacio estas uzataj la vortoj *moa* (por komparativo) kaj *long ol* (por superlativo), kiuj sekvas la adjektivon.

> *liklik* "malgranda"
> *liklik moa* "pli malgranda"
> *liklik long ol* "plej malgranda"

Sed ekzistas du esceptoj, nome la vortoj *planti* "multaj" kaj *hanggre* "malsata", kiuj uzas por la superlativo la vorton *tumas* (ĝi alie signifas "tre", kiel ekz. *liklik tumas* "tre malgranda").

> *hanggre* "malsata"
> *hanggre moa* "pli malsata"

hanggre tumas "plej malsata"

Komparo

Por la komparo estas uzata la vorto *olsem*.

Ples hia na ples long hap olsem i nogut. "Ĉi tiu vilaĝo kaj tiu vilaĝo estas same malbonaj."
Mi gat bigpela moa pik olsem yu gat. "Mi havas pli grandan porkon ol vi (havas)."

Adverboj

Adverboj estas distingataj de la adjektivoj per tio, ke la finaĵo *-pela* mankas. Krome ili staras post la verbo.

Em i strongpela man, em i wok strong. "Li estas forta viro, li forte laboras."
Gutpela buk hia. Em i peim gut. "Tio estas bona libro. Ĝi bone vendiĝas."

Prepozicioj

Ekzistas nur du veraj prepozicioj: *bilong* (el "belong"), kiu signifas "de" aŭ "por" (do parenceco, posedo, proprieto), kaj *long*, kiu signifas ĉion restantan. Kelkaj frazoj estas uzataj kiel prepozicioj, kiel ekz. *long namel (bilong)*, "meze de".

long

Ekzemplo	Esperanto-prepozicio	Traduko
i siutim long spia	kun, per	pafi per sago
i go long rot	sur; laŭ	iri sur strato; iri laŭ strato
i stap long tebol	sur	esti sur tablo
i kam long Siamani	el	veni el Germanio

Ili povas ankaŭ esti kombinata kun substantivoj.[1]

Ekzemplo	Traduko	Kompleksa prepozicio	Traduko
aninit long taunam	sub reto kontraŭ moskitoj, sub moskita reto	aninit long	sub
antap long paia	super fajro	antap long	super
gaden arere long haus	agro/kampo apud domo	arere long	apud; laŭ (direkte)[13]
arere long rot	apud strato		
ausait long penalti eria	ekster sesdekmetra punejo	autsait long	ekster
rum baksait long bikpela laplap	spaco malantaŭ kurteno	baksait long	malantaŭ
		bihain long	malantaŭ; post
i stap insait long haus	esti ene de domo, esti en domo	insait long	ene de, en
graun insait long mak	areo ene de palisaro		

bus klostu long nambis	arbaro proskime al (mar)bordo	klostu long	proksime al; laŭ (direkte)[13]
banis namel long tupela rum	muroj inter du ĉambroj	namel long	inter; meze de
namel long gaden	meze de ĝardeno		
namel long 6 mun na 12 mun	inter ses kaj dek du monatoj		
paslain long bal i kamap	antaŭ venanta pilko, antaŭ pilko, kiu venas	paslain long	antaŭ
raun long haus sel	ĉirkaŭ tendo	raun long	ĉirkaŭ

bilong

Ekzemplo	Esperanto-prepozicio	Traduko
Brata bilong mi i lukim bilong kaikai.	-[1] ; por	Mia frato serĉas manĝon.
Em i brata bilong mi.	-[1]	Li estas mia frato.
Ĝi ankaŭ povas havi funkcion de unu el la konjunkcioj "por (ke)"; "ĉar".		
Em i kam bilong lukim yupela.	por (ke)	Li/Ŝi venas, por vidi vin.
Liklik pikinini i krai bilong no gat kaikai.	ĉar	Malgranda infano krias, ĉar ĝi ne havas manĝon.

[1] Tio estas ekvivalento de la esperanta posesiva pronomo.

Konjunkcioj

Ekzistas la konjunkcioj *na* "kaj", *o* "aŭ", *sapos* "se" kaj *tasol* "sed; nur; se".

na

wanpela meri na tupela pikinini "unu virino kaj du infanoj"

o

tupela man o tripela man "du viroj aŭ tri viroj"

sapos

Sapos mi hanggre, mi mas kaikai. "Se mi estas malsata, mi devas manĝi."

tasol

Se ĝi staras je la komenco de la frazo, ĝi signifas "sed; se", dum ke je la fino de frazo aŭ post iu ajn vorto *tasol* signifas "nur".

Tasol tupela pikinin i no laik kaikai. "Sed du infanoj ne volas manĝi."
Mi save tok Pisin liklik tasol. "Mi povas nur malmulte paroli piĝinon."

Komparu ankaŭ

Mipela tasol i kaikai mango. "Nur ni manĝas mangojn."
Mipela i kaikai mango tasol. "Ni manĝas nur mangojn."

Numeraloj

Tokpisino havas numeralojn el la angla lingvo, sed ofte uzas la finaĵon *-pela*.

Cifro	Tokpisino	Ekzemplo	Traduko	11-20	11-20 el la angla	10-100	10-100 el la angla
1	wan, wanpela	wanpela pikinini	unu infano	wanpela ten wan	ileven	wanpela ten	
2	tu, tupela	tupela buk	du libroj	wanpela ten tu	twelve, twelpela	tupela ten	twenti, twentipela
3	tri, tripela	tripela meri	tri virinoj	wanpela ten tri	tetin, tetinpela	tripela ten	teti
4	foa, fopela	fopela pusi	kvar katoj	wanpela ten foa	fotin	fopela ten	foti
5	faiv, faivpela	faivpela dok	kvin hundoj	wanpela ten faiv	fiftin	faivpela ten	fifti
6	sikis, sikispela	sikispela fail	ses dosieroj	wanpela ten sikis	sikistin	sikispela ten	sikisti
7	seven, sevenpela	sevenpela de	sep tagoj	wanpela ten seven	seventin	sevenpela ten	seventi
8	et, etpela	etpela man	ok viroj	wanpela ten et	etin	etpela ten	eti
9	nain, nainpela	nainpela diwai	naŭ arboj	wanpela ten nain	naintin	nainpela ten	nainti
10	ten, tenpela	tenpela yia	dek jaroj	tupela ten	twenti, twentipela	wan handet	

Pliaj numeraloj estas: *tausen* "mil" (ekz. *tu tausen* "du mil", *tu tausen wanpela ten wan* "2011") kaj *milien* "miliono" (ekz. *tu milien* "du milionoj").[14][22]

Pliaj trajtoj

Duobligo estas tre kutima en tokpisino, dum ke ĝi povas havi malsamajn funkciojn. Laŭ Nose, Masahiko ĝi nur malofte indikas pluralon kaj variecon.[23] Diversaj verboj povas duobliĝi por esprimi ripeton, daŭrigon aŭ ion similan, sed ne ĉiuj.[23]

Semantikaj efikoj de duobligo, laŭ Nose, Masahiko[23]

Unusilaba vorto	Senco	Etimo	Dusilaba vorto	Senco
montras pluralon				
kain[23]	speco	angle *kind*	*kainkain*[23]	diversaj specoj de
wil[23]	rado	angle *wheel*	*wil-wil*[23]	biciklo
varieco				
kala[23]	koloro	angle *color*	*kala-kala*[23]	multekolora, bunta"
mak[23]	signo, marko	angle *mark*	*mak-mak*[23]	bunta

intensivo aŭ iterativo (Nose, Masahiko nomas tion angle *repetitive and continuous aspect*[23])				
danis[23]	danci	angle *dance*	*danis-danis*[23]	daŭrigi dancadon
luk	rigardi	angle *look*	*lukluk*	rigardi, vidi
oltaim[23]	ĉiam	angle *all the time*	*oltaim-oltaim*[23]	ĉiam, eterne; permanente
paitim[23]	bati	angle *fight*	*pait-paitim*[23]	batadi
tok	mesaĝo, vorto; rakonti, diri, paroli	angle *talk*	*toktok*	diskuto, lingvo
hazardeco kaj reciprokeco				
hait[23]	kaŝi	angle *hide*	*hait-hait*[23]	kaŝi je diversaj lokoj
pilai[23]	ludi	angle *play*	*pilai-pilai*[23]	ludadi
was[23]	lavi	angle *wash*	*waswas*[23]	lavi sin

- evitas homonimion kiel ekzemple jene:

Unusilaba vorto	Senco	Etimo	Dusilaba vorto	Senco	Etimo
kus	tuso; malvarmumo; muko	angle	*kuskus*	sekretario, sekretariino // arba kanguruo	malaje *kuskus*
lap	rido; ridi	angle *laugh*	*laplap*	materialo por vestaĵo	
lik	liko; liki	angle *leak*	*liklik*	malgranda; iom	aŭstronezie *ikilik*
mat	mato	angle *mat*	*matmat*	tombo	aŭstronezie
pis	fiŝo	angle *fish*	*pispis*	pisi	angle *piss*
sip	ŝipo	angle *ship*	*sipsip*	ŝafo	angle *sheep*

- Ŝanĝo de la vortospeco:

Ŝanĝo de la vortospecoj per duobligo, laŭ Nose, Masahiko[23]

Unusilaba vorto	Senco	Etimo	Dusilaba vorto	Senco
sing[23]	kanti	angle *sing*	*sing-sing*[23]	tradicia festivalo
ting[23]	ideo, opinio	angle *think*	*ting-ting*[23]	pensi

Kelkaj el ĉi tiuj trajtoj devenas el komunaj gramatikaj normoj de la Aŭstroneziaj lingvoj - kvankam plej ofte en simpligita formo. Aliaj trajtoj, kiel ekz. la vortordo, estas pli similaj al la angla lingvo.

Vortotrezoro

La vortotrezoro enhavas vortojn de malsama deveno, nome ĉirkaŭ 85 % el la angla, kaj la resto el melaneziaj lingvoj, la malaja, la portugala kaj la germana lingvoj.

Informoj pri la vorta deveno

Vorto	Senco	Etimo	Komento
El la angla			
ai	okulo	eye	Diference al la angla havas ankaŭ pliajn signifojn.
ain	fero, ŝtalo	*iron*	
ainim	gladi		+ sufikso *-im*
ais	glacio	*ice*	
bagarapim	dolori; neniigi, detrui"	*bugger up* + *him*	
bata	butero	*butter*	
bruk	rompi; rompiĝi	*broken*	
kisim	ricevi; preni; alpreni	*catch him*	
meri	virino	*Mary* (ofta virina nomo)	
mi	mi	*me*	
sapos	se	*suppose*	
yu	vi	*you*	Diference al la angla ĝi estas uzata nur en la singularo.
El malaja lingvo			
binatang	insekto; viruso	*binatang* 'Tier, Vieh'[24][25]	El la malaja
sayor	vegetaĵo	*sayur*[24]	
susu	lakto; mamo	*susu*[24]	
El melaneziaj lingvoj			
balus	kolombo; aviadilo	*balus* 'airplane'[26] (flugmaŝino), *balu* 'pigeon'[27] (kolombo)	El Tolai
bung	kunveno; merkato; kunveni	*bung* 'market'[26] (merkato)	
diwai	arbo; ligno	*davai* 'wood, tree'[26] (ligno, arbo)	
kiau[28]	ovo; bulbo; testiko	*kiau* 'egg'[26] (ovo)	
kumul[28]	paradiza birdo	*kumul* 'bird of paradise'[29] (paradiza birdo)	
lapun[28]	maljuna; aĝa		
liklik	malgranda; iom	*ikilik* 'little'[26] (malgranda)	
palai[28]	lacerto		
dinau	ŝuldo; lupreni monon	*dinau* 'debt'[30] (ŝuldo)	El la fiĝia

El la germana			
bang	benko	*Bank*	
beten[28][29]	preĝi	*beten*	
binen	abelo	*Bienen*	Apud *bi*
bogen	arko	*Bogen*	
boksen	boksi; batali per pugnoj	*boxen*	
bros[28][29]	brusto	*Brust*	
gip	veneno	*Gift*	
gumi[28][29]	gumo; guma bendo; skrapgumo; ...	*Gummi*	
raus[28][29]	foriri	*raus*	
rausim	forigi; ellasi[31]"		+ sufikso *-im*
supka	unurada puŝĉaro	*Schubkarre(n)*	
El la portugala			
pikinini[28][29]	bebo; infano, filo, filino; ido; semo	*pequeninho* "tre malgranda"	
save[28][29]	koni; povi; scii; senti; kono, scio	*saber*	

Kunmetado

Multaj vortoj estas formataj per kunmetado, ĉe kio kelkaj vortoj ĉefe nur aperas en kumetaĵoj. Ĉe tio ekzistas diversaj variantoj, nome la jenaj: kune kaj dise skribataj kunmetaĵoj.

Kune skribataj

Laŭ Krifka tio estas kunmetaĵoj kun modifikatoroj (germane *Kompositionen mit Modifikatoren*)[1], dum ke Mihalic nomas tion kunmetaĵoj (angle *Compounding*).

- *ara-* (el la angla *other*. Nur estas uzata en kunmetaĵoj aŭ kun la sufikso *-pela*.)
  - *arakain* "malsama"
  - *arasait* "aliflanke"
- *bik-* (el la angla *big*. Ĝi ĉefe estas uzata en kunmetaĵoj.)[14]
  - *bikbel* "bubalo; grasa viro" (dua parto estas *bel*)
  - *bikbrata* "pli aĝa frato" (dua parto estas *brata*)
  - *bikbus* "sovaĝa arbaro" (dua parto estas *bus*)
  - *bikman* "gvidanto; ĉefo" (dua parto estas *man*)
  - *bikmaus* "laŭte kriegi" (dua parto estas *maus*)
  - *biknait* "noktomezo" (dua parto estas *nait* "nokto")
  - *biknem* "famo, reputacio; fama" (dua parto estas *nem* "nomo")
  - *biksan* "tagmezo" (dua parto estas *san* "suno")
- *mausgras* "barbo" (el la vortoj *maus* "buŝo", *gras* "herbo; hararo; lano")
- *wan-* (el la angla *one*. Ĝi ĉefe estas uzata en kunmetaĵoj.)[14]

- *wanbel* "konsento; paco" (dua parto estas *bel*)
- *wanblut* "sange parenca ulo" (dua parto estas *blut*)
- *wande* "unufoje; foje; iam" (dua parto estas *de*)
- *wanhaus* "homoj, kiuj loĝas en la sama domo" (dua parto estas *haus*)
- *wanpela* "unu; sola" (dua parto estas la sufikso *-pela*)
- *wanples* "persono el la sama vilaĝo" (dua parto estas *ples*)
- *wanskul* "samlernejano; samklasano" (dua parto estas *skul*)
- *wantok* "samlingvano; sametnano; amiko" (dua parto estas *tok*)
- *wanwok* "kolego" (dua parto estas *wok*)

Dise skribataj

Tokpisino ofte uzas kunmetojn de diversaj vortoj, dum ke la angla uzas apartajn radikojn. La ĉitieaj tabeloj enhavas formojn kun kaj sen la vorto "bilong". Laŭ Krifka la varianto sen "bilong" estas kunmetaĵo kun nomenoj (germane *Kompositionen mit Nomina*)[1], dum ke Mihalic nomas tion nominalaj frazoj (angle *noun phrases*).

Tokpisina	Angla	Esperanto
gras	**grass**	**herbo, ...**
gras bilong fes	beard	barbo
gras bilong het	hair	hararo (sur la kapo)
gras bilong pisin	feather	pulmaro
gras antap long ai	eyebrow	brovo
gras nogut	weed	trudherbo
bilum	**net bag**	**retsako**
bilum bilong pikinini	placenta, uterus	placento, utero

Krome eblas priskribaj variantoj:

- *pikinini i dring susu yet* "bebo" (laŭvorte "infano, kiu ankoraŭ trinkas lakton")

Tokpisina	Angla	Esperanto
bel	**stomach; pregnancy; heart (emotions)**	**stomako; ventro; gravedeco; koro (emocioj)"**
belhat, bel i hat	angry; impatient	ĉagrena, kolera; malpacienca
bel hevi, bel i hevi	sad, worried	malgaja
bel isi, bel i isi	calm	trankvila
bel kirap, bel i kirap	aroused, excited	ekscitita
bel kol, bel i kol	at ease, reconciled	(inter)konsoliĝinta
bel kros, bel i kros	angry	ĉagrena, kolera
bel pas, bel i pas	sad	malgaja
haus	**house**	**dom**
haus ais	walk-in freezer	industria fridujo, friduja ĉambro, glaciĉambro
haus balus	hangar	hangaro
haus buk	library	biblioteko
haus kar	garage	garaĝo
haus skul	school building	lerneja konstruaĵo
ples	**place**	**loko; placo**
ples pilai	playground	ludejo
ples singsing	dancing ground	dancejo

Afiksoj

Tokpisino havas nur malmulte da afiksoj, kiuj eĉ nur estas sufiksoj[28].

- **-pela** - ĝi estas uzata ĉe adjektivoj, kelkaj pronomoj kaj numeraloj.
  - *bikpela* "granda; grava"
  - *dispela* "ĉi tiu; ĉi tio"
  - *tripela* "tri"

- **-im** - ĝi formas transitivajn verbojn el diversaj vortospecoj. Kelkaj verboj ekzistas eĉ nur kun ĉi tiu sufikso.
  - *ritim* (el *rit*) "legi"
  - *raitim* (el *rait*) "skribi"
  - *helpim* "helpi" (Ne estas formo sen sufikso.)
  - *bihaimim* "sekvi; obei; kopii" (el *bihain* "post; malantaŭ")

Varia ortografio

Ĉe kelkaj vortoj la ortografio povas varii depende de la dialekto aŭ fonto.

- *aitingk*[13], *aiting*[32], *ating*[14] "mi pensas, mi kredas, mi supozas; verŝajne; eble"
- *bilong*, *bolong*[32], *blong*, *blo* "de, el"
  - *bilong wanem*, *bolong wonem*[32] "kial?"
- *dispela*, *disla* "ĉi tiu, ĉi tio"[1]
- *em*, *en* (ofte post la vortoj *bilong* kaj *long*, do: *bilong en*, *long en*) "li, ŝi, ĝi"[1]
- *halivim*, *halvim*, *helvim*, *helpim* "helpi"
- *long*, *lo* "sur, ĉe, ..."[1]
- *-pela*, *-pla* sufikso ĉe numeraloj, adjektivoj kaj pronomoj[1]
- *popaia*, *popai* "maltrafi; gliti"
- *sisa*, *susa* "fratino; (en kelkaj areoj) gefrato aŭ proksima amiko de la kontraŭa sekso"
- *wanem*, *wonem* "kio"

Sencaj diferencoj

Diference al la anglalingvaj etimoj vortoj ofte havas malsamajn resp. aldonajn sencojn.

Vorto	Angla etimo	Senco laŭ la angla lingvo	Aldonaj sencoj
antap	on top	supre	supren; surfaco; pli forta, pli bona, pli prudenta
gras[32][33]	grass	herbo	har(ar)o[33]; plumo[33]
karim	carry (+ him)	porti	naski
inap	enough	sufiĉe	kapabla
laik	like	deziro, deziri; volo, voli; ŝato, ŝati[34]	esti -onta
sapim	sharpen (+him)	akrigi	skulpti

Homonimio

Ĉar Tokpisino havas malpli da sonoj ol la angla lingvo, ofte ekzistas homonimoj, kiuj havas malsamajn etimojn.

Estiĝo de homonimoj

Vorto	Senco	Etimo
bek	poŝo, teko; sako	angle bag
	reen	angle back
bekim	pago; redoni; respondi	angle back + him
	baki	angle bake + him
bin	fazelo; fabo	angle bean
	-is	angle been
hat	malmola	angle hard
	koro	angle heart
	ĉapelo; ĉapo	angle hat
	varmega, varma	angle hot
sel	ŝelo; ...	angle shell
	velo; veli	angle sail; to sail
	ĉelo (biologio)	angle cell

Ofte estas uzataj aldonaj elementoj aŭ alternativaj formoj, por eviti homonimojn.

Sen aldona elemento	Senco	Etimo	Kun aldona elemento	Senco	Etimo
nil	najlo; pinglo	angle *nail*	*nildaun*	genui	angle *kneel* + *down*
ol	ili	angle *all*	*olpela*	malnova, maljuna	angle *old* + *fellow*
wok	labori	angle *work*	*wokabaut*	migri	angle *walk* + *about*

Sed ankaŭ reduplikacio povas esti uzata por tio.

Kiel ekz. el la anglaj vortoj *ship* kaj *sheep* estiĝis la vortoj *sip* „ŝipo“ kaj *sipsip* „ŝafo“.

Notoj

1. ↑ 1,00 1,01 1,02 1,03 1,04 1,05 1,06 1,07 1,08 1,09 1,10 1,11 1,12 1,13 1,14 1,15 1,16 1,17 1,18 1,19 1,20 1,21 1,22 1,23 1,24 1,25 1,26 1,27 1,28 1,29 1,30 1,31 1,32 La artikolo "Tok Pisin, die Verkehrsprache Melanesiens", sur la paĝoj 16 ("-pela"), 29 ("long", substantivoj), 33 (progresa formo, modala *inap*) kaj 39 ("long") (http://amor.rz.hu-berlin.de/%7Eh2816i3x/Lehre/2007_HS_TokPisin/HS_TokPisin_2007.pdf)
2. ↑ 2,0 2,1 Mihalic, paĝo 29
3. ↑ 3,0 3,1 3,2 Mihalic, paĝo 33
4. ↑ Mihalic, paĝo 32
5. ↑ Mihalic, paĝo 34
6. ↑ Mihalic, paĝo 22

7. ↑ Mihalic, paĝo 24
8. ↑ 8,0 8,1 Mihalic, paĝoj 13-14
9. ↑ Ĉapitro pri pronomoj en kurso de Unilang pri Tokpisino (http://www.unilang.org/course.php?res=80#ci--l2)
10. ↑ Ĉapitro pri posesivaj pronomoj en kurso de Unilang pri Tokpisino (http://www.unilang.org/course.php?res=80#ci-l3posspronouns)
11. ↑ 11,0 11,1 11,2 11,3 11,4 11,5 Laŭ Kauderwelsch, paĝoj 55-56
12. ↑ Enhavas la tutan frazon en iomete alia formo, nome *Pukpuk hia i gat bikpela tis.* (http://www.linguist.de/TokPisin/tp02-de.htm)
13. ↑ 13,0 13,1 13,2 13,3 Vidu Kauderwelsch 18, sur paĝoj 156 (arere long), 161 (klostu long), 170 (tit)
14. ↑ 14,0 14,1 14,2 14,3 14,4 14,5 "TOK PISIN ENGLISH Dictionary" sur la paĝoj 109 (tit), 191 (yet sub la kapvorto **each other**), 9 ĝis 11 (bik-), 117 ĝis 119 (wan-)
15. ↑ 15,0 15,1 15,2 15,3 15,4 15,5 Mihalic, paĝoj 15-16
16. ↑ Mihalic, paĝo 81
17. ↑ 17,0 17,1 17,2 Mihalic, paĝo 15
18. ↑ Artikolo pri la reciprokeco en la lingvo. Ekzemplo en Tokpisino estas sur la paĝo 13. (http://www.nias.knaw.nl/Publications/Uhlenbeck%20Lecture/23_Ekkehard%20Konig) angle
19. ↑ 19,0 19,1 Mihalic, paĝoj 17-18
20. ↑ Mihalic, paĝo 18
21. ↑ 21,0 21,1 Mihalic, paĝo 19
22. ↑ Paĝo pri numeraloj en Tokpisino (http://www.languagesandnumbers.com/how-to-count-in-tok-pisin/en/tpi/) angle
23. ↑ 23,00 23,01 23,02 23,03 23,04 23,05 23,06 23,07 23,08 23,09 23,10 23,11 23,12 23,13 23,14 23,15 23,16 23,17 23,18 23,19 23,20 23,21 23,22 23,23 23,24 23,25 23,26 23,27 23,28 Laŭ Nose, Masahiko: Reduplication in Tok Pisin (http://repository.tufs.ac.jp/bitstream/10108/69374/1/aall6_5.pdf) angle
24. ↑ 24,0 24,1 24,2 Erich-Dieter Krause: Wörterbuch Indonesisch-Deutsch, 4a eldono, 1995, ISBN 3-324-00470-5, sur la paĝoj 61 (*binatang*); 399 (*sayur*); 434 (*susu*)
25. ↑ Adolf Heuken: Wörterbuch Deutsch-Indonesisch, 2a eldono, 1994, ISBN 3-324-00609-0, sur la paĝoj 506, 577
26. ↑ 26,0 26,1 26,2 26,3 26,4 Kurso pri Tolai-lingvo (http://www.sil.org/pacific/png/pubs/46855/Tolai_Language_course.pdf) Alia versio de la kurso (http://www.sil.org/pacific/png/pubs/49618/TolaiLang1968.pdf)
27. ↑ Pri la fonologio de Tolai (http://www.sil.org/pacific/png/pubs/0000341/Tolai.pdf)
28. ↑ 28,00 28,01 28,02 28,03 28,04 28,05 28,06 28,07 28,08 28,09 28,10 Paĝo pri lingvaj varietoj (http://www.hawaii.edu/satocenter/langnet/definitions/tokpisin.html) angle
29. ↑ 29,0 29,1 29,2 29,3 29,4 29,5 29,6 Dua parto de kurso (http://www.uni-giessen.de/anglistik/ling/Staff/huber/Courses/0910%20WS/PC/P&C%20TP02.pdf) angle
30. ↑ Diskuto pri aŭstronezaj vortoj en Tokpisino (http://mailman.anu.edu.au/pipermail/mihalic/2002-October/000318.html) angle
31. ↑ germane *entlassen*
32. ↑ 32,0 32,1 32,2 32,3 Kenneth G. Linton: Kanako el Kananam, 1960
33. ↑ 33,0 33,1 33,2 En *gras bolong em i dai pinis* „lia hararo jam griziĝis“, sur la paĝo 71, kaj en *gras bolong kokoruk* „herbaĵo de koko“, sur la paĝo 72, de *Kanako el Kananam*
34. ↑ Laŭ la vortaroj kaj Kauderwelsch

Fontoj

- Bildatlas der Sprachen, ISBN 978-3-937872-84-1, paĝoj 107, 147-153 (pri tokpisino); paĝoj 107-109 (pri hirimotua lingvo) germane
- Francis Mihalic: The Jacaranda Dictionary and Grammar of Melanesian Pidgin, ISBN 0-7016-8224-8 angle, tokpisine
- Kauderwelsch Band 18, Pidgin-Englisch für Papua-Neuguinea, 3a eldono 2001, ISBN 3-89416-517-0 germane
- Papua New Guinea TOK PISIN ENGLISH Dictionary, The perfect dictionary for learners of English and Tok Pisin, Oxford University Press 2008, 1a eldono, ISBN 978-0-19-555112-9 angle, tokpisine

Vidu ankaŭ

- La Tok-Pisina Vikipedio: http://tpi.wikipedia.org
- Listo de kreolaj lingvoj
- Listo de lingvoj

Eksteraj ligiloj

- Programo en Tokpisino de Radio Australia (http://www.abc.net.au/ra/tokpisin/) tokpisine
- Gramatiko de Tok Pisin (http://www.linguist.de/TokPisin/) germane, angle
- Seminara materialo de prof. dr. Krifka (http://amor.rz.hu-berlin.de/%7Eh2816i3x/Lehre/2007_HS_TokPisin/HS_TokPisin_2007.pdf) germane, angle
- Datoj pri Tokpisino ĉe Ethnologue kun tre multe da literaturo (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=tpi) angle
- Tradukado (angla-tokpisina) (http://www.pngwebdirectory.com/dictionary.php) angle
- Paĝo pri lingvaj varietoj (http://hawaii.edu/satocenter/langnet/definitions/tokpisin.html) angle
- Unilang-wiki pri Tokpisino (http://www.unilang.org/wiki/index.php?title=Tok_Pisin) angle
- Artikolo pri la demando "Ĉu Tokpisino estas simpligita angla?" (http://banyubiru.wordpress.com/2007/09/15/the-grammar-of-tok-pisin/) angle
- Vortaro de la projekto "Mihalic Project" (http://www.mihalicdictionary.org/Index.htm) angle

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Tokpisino&oldid=6475055"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 09:05, 27 nov. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.